2.ª Ep. AÑO VIII N.º 41 (177) ENERO - FEBRERO 1970

# Boletin

## DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

# 30.ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



Jen vidaĵo de la ekstrema norda parto de Mieres, nia Kongresurbo ĉijara.

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

*Director:*
Domingo Martínez Benavente
*Redacción y Administración:*
Inés Gastón
Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, dcha.
ZARAGOZA

*ADRESOJ*

Hispana Esperanto-Federacio:
Prezidanto:
S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16

Ĝenerala korespondado:
Sekretario:
S-ro Manuel Figuerola Palomo
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16

Monsendoj:
Kasisto:
S-ro Raimundo Ibáñez Crespo
Str. Princesa, 78, 2.º
MADRID-8
Ĉekkonto: N.º 24.692/10,
Banco Ibérico
Avda. José Antonio, 18
MADRID-14

Sendaĵojn pri statistiko kaj informado al:
S-ro Salvador Aragay
Str. Bassegoda, 40, 3.º, 1.ª
BARCELONA-14

Libroservo kaj Eldona-Fako:
F-ino Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35, 4.º, dcha.
Ĉekkonto: N.º 17917, Banco Bilbao
ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 120 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Estas je via dispono afiŝoj, poŝtkartoj kaj glumarkoj de la 30-a Hispana Kongreso de Esperanto. Mendu ilin al la Loka Kongresa Komitato, str. Sanjurjo, 11, Mieres (Asturias), aŭ al Libroservo de H.E.F., P.º Marina Moreno, 35, Zaragoza.

Prezo: Afiŝoj, 10 ptoj. unuo. Poŝtkartoj, 3 ptoj. unuo. Glumarkoj, 3 ptoj. folieto 6 glum.

## De Secretaría

Karaj kaj estimataj samideanoj:

Post kora saluto mi anoncas al ĉiuj membroj de H.E.F., ke mi alvenas al sekretaria posteno de Hispana Esperanto-Federacio kun la plej alta idealo kaj kun la celo labori multe por la disvolvigo kaj altigo de la internacia lingvo.

Certe, nenion mi povos fari se mi ne havas la helpon kaj kunlaboron de ĉiuj.

Aliaflanke, ĉiam mi estos preta realigi viajn sugestojn kaj indikojn.

Sendube, mi estos via nova amiko kaj mi kredas ke mi havos la komprenemon de la hispanaj esperantistoj.

Kun afabla rememoro por Fino. Inés Gastón kaj kun la espero de grandaj sukcesoj por nia idealo, ree mi salutas ĉiujn kaj restas je via dispono ĉe la sekretariejo, Víctor de la Serna, 19, Madrid-16, Tel. 2503769.

La Sekretario
*M. Figuerola*

---

El día 3 de enero celebró reunión extraordinaria la Directiva de la Federación, en la que se efectuó el traspaso de poderes a los nuevos directivos; desde ese día, el domicilio social de la Federación quedó trasladado oficialmente a Madrid, siendo su domicilio el de su Presidente, quedando por lo tanto trasladadas también la Secretaría y Tesorería de la misma.

Así, pues, todo aquel que todavía no haya pagado su cotización a H.E.F., debe hacerlo a don Raimundo Ibáñez Crespo, Tesorero.

El número de "Boletín" correspondiente a marzo-abril será enviado como en años anteriores contra reembolso de la cotización a todos aquellos que no la hubieran pagado antes del 15 de marzo.

---

Por kompletigi miajn kolektojn mi bezonas kelkajn mankantajn numerojn de Hispana Esperantisto, Tutmonda Espero, Gazeto Hispana, Gazeto Andaluzia, La Suno Hispana, Nia Vivo, Progreso Esperantista, Kataluna Esperantisto kaj Bulteno de Paco kaj Amo.

Bv. skribi al S-ro Ramón Molera. Santa Joaquina, 13. Moyá (Barcelona). Hispanujo.

# PREZENTO DE LA NOVA ESTRARO DE H. E. F. AL LA MEMBRARO

**Altestimataj gekunhef-anoj kaj geamikoj:**

Vi sendube, estas bone informitaj pri la fakto, ke H.E.F. havas novan estraron ekde la tria de januaro 1970-a. Sed ĝi, antaŭ ol starigi programon kaj komenci sian publikan agadon, deziras prezenti sin al vi; saluti vin tutkore, kaj sendi dankesprimojn al ĉiuj pri la honoro kiun vi faris al la estraranoj metante en iliajn manojn la zorgon kaj gvidadon de la interesoj de la Federacio.

La Nova Estraro estas tute konscia pri la respondeco kiun ĝi prenis sur sin kompare kun la antaŭa estraro pro personaj, profesiaj kaj etosaj cirkonstancoj, kaj pri la malfacilaĵoj kiujn ĝi trovos por efektivigi la plenumadon de sia tasko, Tamen, ĝi estas preta labori senĉese kaj uzi sian volon, sian energion, sian scipovon kaj ĉiujn eblojn por serĉi novajn vojojn, kiuj ebligu al ĝi plifortigi la vivon de H.E.F. kaj disvastigi la Internacian Lingvon en ĉiuj sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj medioj, en kiuj la enkonduko de Esperanto estus reale efika por pruvi ĝian taŭgecon kiel ilo por simpligi la laborojn de la internaciaj organizaĵoj kaj rapidigi la realigon de iliaj specifaj celoj. Por plilarĝigi la kampon de la Internaciaj Rilatoj kaj perfektigi ilin; kaj antaŭ ĉio, por faciligi al la homoj de ĉiuj sociaj niveloj la kreon de individuaj internaciaj interrilatoj, laŭ vole, en ĉiuj branĉoj de la homa aktiveco pere de komuna lingvo. Resume, ĝi faros ĉion kio estas realigebla por aldoni pozitivan ĉapitron al la historio de la Esperantista Movado en Hispanujo.

Samtempe, la nova estraro volas precizigi sian vidpunkton rilate la nunan situacion de la Hispana Esperantista Movado, ĉar ĝi estas la starpunkto de ĝia estonta agado. Konsekvence, ĝi konsideras kaj deklaras: unue, ke la antaŭaj estraroj realigis firme kaj serioze la politikon, kiu estis pli deca ĉiumomente por revalorigi la movadon kaj firmigi la Federacion. La fruktodonaj rezultoj de tiu politiko estas fakto nekontraŭstarebla kies studo bedaŭrinde ne estas farebla ĉi tie pro manko de spaco kaj aliaj motivoj malgraŭ sia utileco. Due, ke inter la estraranoj de la antaŭaj estraroj, kiuj laboradis entuziasme kaj efike por havigi al la movado la altan prestiĝon, kiun ĝi atingis en la diversaj sociaj sektoroj, meritas specialan mencion la Honoraj Prezidantoj de H.E.F. Ekscelenca S-ro D-ro Sancho Izquierdo kaj D-ro Herrero Arroyo, la Sekretariino de la antaŭa estraro, F-ino Inés Gastón kaj ŝiaj pli proksimaj kunlaborantoj, inter kiuj elstaras F-ino Emilia Gastón. La Nova Estraro, kiu fervore deziras imiti eĉ superi la ekzemplon de la laboremaj pioniroj en la plenumado de sia tasko, gratulas ilin kaj rimarkigas emfaze ĉi tiun menciindan fakton, ĉar agi alimaniere estus maljustaĵo.

Finfine, la nova estraro esperas, ke ĉiuj vi, altestimataj gekunhef-anoj, faciligos ĝian taskon per via morala kaj materiala apogo. Konsideru, ke via kontribuo estas necesa kondiĉo por progresigi la Hispanan Esperantistan Movadon. Sen via kunlaboro la streboj kaj la agado de la estraro rezultos nulaj. Pro tio, ĝi antaŭdankas vian efikan helpon kaj restas je via dispono por studi sugestojn kaj proponojn, kaj por ilia utiligo en la oportuna momento.

Neniam forgesu ke la sukceso aŭ malsukceso de nia komuna celo ne estas nura afero de la estraro: ĝi estas ankaŭ via.

*Angel FIGUEROLA AUQUE*
*Prezidanto de*
*Hispana Esperanto Federacio*

# En la Blonda Anglujo

Kia plezuro vojaĝi eksterlanden per Esperanto! Tiam ni vere konscias ke nia lingvo povas roli gravan postenon en nia nuntempa vivo kaj efike helpi al interkompreniĝo. Estas deve insisti pri tio, ĉar se ni reduktas la universalecon de nia idealo al hejma medio —nome Eŭropo— ni tuj konstatas kiel, por atingi la dezirindan unuecon ankoraŭ estas necese malaperigi apriorajn konceptojn kaj ne decajn antaŭjuĝojn kiuj malpermesas al ni vidi la realan bildon de alilandaj popoloj. Domaĝe ankaŭ ke tiuj modernaj diskonigiloj kiel ĵurnaloj, radio, televido, k.t.p. tre ofte ĉu subtile ĉu malkaŝe subtenadas opiniojn kaj kriteriojn nur akordajn al politika cirkonstanco. Kaj tio okazas ĉiulande. Feliĉe ni havas Esperanton, kiun ni devas uzi kiel pacan liberigilon por havi pli ĝustan, personan kriterion pri io aŭ iu ajn fremda. Tamen necese estas malŝpari sindonemon por interkompreniĝo, ĉar funde, tia estis la Zamenhofa penso. Nu, sub tiu devizo ni eniru Anglujon.

Haveno de Southamptom frumatene je la fino de Aŭgusto. Nebulo kaj griza ĉielo. Siluetoj de gruoj kaj fabrikaj kamenoj kiuj alproksimiĝas iom post iom. Multenombraj longflugilaj mevoj super, ĉirkaŭ, apud nia ŝipo. Sur ĝi tia speciala ekscito kiu kvazaŭ epidemio atakas la plej multon el la pasaĝeroj dum longa vojaĝo. Tamen, tio estas evidenta, la simptomoj estas malpli rimarkeblaj ol en similaj situacioj en nia lando: Ne tiom da krioj, bruo kaj eĉ disputoj. Unuvorte, la angla pasaĝera elcento estis sendube tre multa, pro tio mem la eliro tra la dogano trankvile kaj bonorde okazis.

Nia celo nun estas Londono. En aŭtomobilo de vaska amiko ni rapidas tien. Bona ŝoseo, ĉarma pejzaĝo. Mildaj deklivoj, arbaretoj. Ofte la tipa bildo de trankvila bovaro sur paŝtejo. Ĉie ĉiaj nuancoj de la verda koloro. Ravaj panoramoj por okuloj alkutimiĝintaj al niaj sekaj, akraj horizontoj! La suno jam brilas, agrablega vetero. Sed la tempo rapide forpasis, avertoj pri la proksimeco de London: La trafiko pli kaj pli densa, abundaj trafikrekomendoj. Oni sentas, oni tuŝas tian viglan atmosferon kiu, same kiel ie ajn, atentigas nin pri la eniro en ĉiun grandan urbon. Tamen la veturado ĉiam sur la maldekstra flanko! Krome tiujn familiajn Casa Pepe, Font del Gat aŭ El Cortijo anstataŭas la nomoj Trafalgar Tavern, Royal Pub, Drinker's Room kaj multaj aliaj. Ni eksuspektas ke en la blonda kaj verda Anglujo la laboristaj kaj konservativaj partianoj tre ŝatas bieron, viskion, brandon kaj komprenele la ĉie troveblan Coca Cola kiu faciligas digeston, malaperigas soifon kaj helpas solvi ĉiajn aferojn...

Alveno finfine ĉe S-ron Buttinger, nia gastiganto. Unu neforgeseblan semajnon tie. Familia, esperanta etoso. S-ro Buttinger havas ok gefilojn. Deknaŭ jara la plej aĝa. Spite ĉion, aŭ pro tio mem, vi ekmiru; Ĉe li ankaŭ jenaj gastoj: Du belaj kanadinoj, du junaj japanoj, unu germano, du belgoj, kaj unu ĉarma ĉekoslovakino. Ĉu Babel-Turo? Neniel: Lingvan problemon solvis Esperanto kaj hejmajn problemetojn S-ino Buttinger kies entuziasmo kaj sindonemo estas admirindaj. Imitenda ekzemplo, entute.



Ion pri Londono. Ne tro, ĉar unusemajna vizito al tiu monstra urbego —monstra laŭ vasteco, mi klarigu tuj— nur permesis al mi ekkoni kvaronparton, mi opinias. Plie se oni konsideras ke la Soho-kvartalo speciale altiras la hispanojn (ĉu vaskoj, ĉu katalunoj aŭ madridanoj) kiel mi rimarkis, mi nur devus rakonti pri Picadilly kaj ĝia apuda, malvirta parto; malgraŭ ĉio ni havis tempon promenadi, kion ni tre ŝatas, kaj rigardi plej famkonatajn bildojn: Westminster, Dwning Street, Houses of Parliament, Tower Bridge...

Intence mi skribas angle tiujn nomojn, ĉar tiel la nuancoj pri fremdeco konserviĝas pli bone. Matenon mi pasigis ankaŭ en la Tate Gallery kie pluraj verkoj atestas pri la genio de Picasso, Miró kaj Dalí.



Surstrate Londono agrable kaj ĉarme surprizas nin, des pli se la vetero sin montras gastema kiel fakte okazis dum la plej granda parto de nia restado. Ĉiam apud la plej viglaj kaj trafikdensaj partoj vi certe trovos silentan placeton aŭ trankvilan angulon kun maljunaj arboj kaj florplenaj ĝardenoj· ankaŭ la verdan ebenaĵon de alloga parko kie la popolo ripozas, legas, sportas, aŭskultas koncerton aŭ simple manĝas ĉokoladon el Yorksire kaj trinkas Pepsi: Por ĉiuj estas libera loko, eĉ por la abundaj, amindumemaj paroj, kiuj, vi jam scias, nur postulas anguleton.

Ni atentigu vin ankaŭ ke Londono estas nuntempe altira, magneta urbo por la junuloj. Ili, papilia nedanĝera plago, invadas ĉion: Magazenojn, drinkejojn, dancejojn, muzeojn... en mini-jupoj kaj malgladitaj pantalonoj. Ili promenas sur la trotuaroj de Oxford Street kie, dekstre kaj maldekstre, seninterrompa vico de vendejoj montras al ni ĉiam tenteman aĉetaĵon por nia konsumanta socio. Ili avide rigardas kaj aĉetas la lastajn ornamaĵojn kaj vestmodelojn en la okulfrapega Carnaby Street kiu evidentigas kiom multekostaj estas sensencaĵoj se la modo imponas ilin. Sed tiu juna spektaklo apoteozas en Picadilly Circus. Tie, ĉirkaŭ la Eros Funtein, sidas, staras, kuŝas tiuj internaciaj "Hippies" kies ĉefa celo verŝajne estas promocii plej strangajn vestmodojn kaj paleolitikajn hararojn. Hindaj tunikoj, Lewi's pantalonoj, aŭstraliaj ĉapeloj, deknaŭjarcentaj paltoj, Cow-Boy ĉemizoj, afrikaj amuletoj, Gandhi-okulvitroj, ukrainaj botoj, nudaj piedoj; ĉio sin miksas kvazaŭ senmaska karnavalo sub taga lumo. Estas sciiginda ilia plej konata slogano: Amu kaj ne plu militu. Konatigindaj ankaŭ la idoloj: Joan Baez, Beatles, Bob Dylan, Allen Ginsber, Jank Kerouak, Norman Mailer. Muziko kaj literaturo. Ĉu nur hazarde aperas la nomoj de tiuj idoloj trans la kristaloj de la plej multaj butikoj de sondiskoj kaj libroj antaŭ kiuj mi haltetis scivoleme? Homa psiko estas komplika surprizskatolo kies enhavon ankoraŭ ni ne elĉerpis.

Adiaŭ al Picadilly. Lastan promenadon sur londonaj trotuaroj: Regent Street, Trafalgar Square —kie Nelson defias la kapturniĝan malsanon— Whitehall. La stratoj milde deklivas al la rivero. Tie supre, la kvarvizaĝa Big-Beg. Vespera horo. La cirkulado densiĝis. Elstaras ĉiam la du etaĝaj ruĝaj aŭtobusoj similaj al obeemaj elefantoj el la trafika bestaro —permesu la metaforon—. Abundegas ankaŭ la nigraj, funebraj Austin-taksioj. Antaŭ vojaĝagentejo ni nostalgias pri nia kara Hispanujo: Torremolinos, Mallorca, Benidorm, Sitges. Moderaj prezoj invitas al ĉiu anglo sin rosti —tio ne estas metaforo— sub nia suno. Tamen morgaŭ ni vojaĝos pli norden, al Leeds.

Subtera fervoja stacio englutas nin. Descendante sur la meĥanika ŝtuparo ni eksentas ke tie, sur la londonaj trotuaroj la horoj rapide forpasis, ke Londono elprenis parton de nia natura koro kaj ni promesas al ni denove travivi ĝian junan, allogan, liberan medion. Kaj mi estas obstina...

*Emilio*

## INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO EN RIMINI

Okaze de la 22-a Internacia Fervojista Esperantista Kongreso, la itala urbo Rimini apud la Adriatika maro gastigos la fervojajn esperantistojn el Eŭropo de la 16-a ĝis la 22-a de Majo de 1970.

Dum tiuj ses tagoj okazos kelkaj fak-kunvenoj de delegitoj de la 20 landaj asocioj apartenantaj al I.F.E.F.; krom la oficiala akcepto de la urbestro okazos vizitoj al fervojaj entreprenoj kaj diversaj ekskursoj.

Dum la kongreso, la fervojistaro interrilatas, traktas kaj diskutas pere de la internacia lingvo Esperanto, pri diversaj problemoj de sia komuna profesio. Jam de 1949 niaj I.F.E.F.-kongresoj estas el la plej gravaj organizataj ĉiujare.

Al ĉi tiu interesa kongreso aldoniĝas la tre agrabla restado en la belega adriatika marbordo. Pro tio oni esperas la aliĝon de multnombraj hispanaj esperantistoj, precipe fervojistoj ĉar ĉiujare kreskas la fervoro inter ili por ĉeesti la Internacian Fervojistan Esperantistan Kongreson.

La Kongres-kotizo estas:

| | |
|---|---|
| Ĝis la 30-4-1970, 6.000 liroj ... | 650 ptoj. |
| Familiano, pensiulo kaj junuloj ĝis 21 jaroj 50 % rabato. | |
| Kompleta restado en hotelo apud la maro, 2.000 liroj po tage ... | 225 ptoj. |

*EKSKURSOJ DUM LA KONGRESO*

| | |
|---|---|
| Duontaga ekskurso al sendependa respubliko San Marino, 800 liroj ... | 90 ptoj. |
| Duontaga ekskurso al Ravena, 1.400 liroj ... | 150 " |
| Tuttaga ekskurso al Bologna, 3.200 liroj ... | 350 " |

Informoj estas riceveblaj ĉe:

Rafael Devís Pascual. Str. Sicilia, 264, Esc. 2, 3.° C. Barcelona-13.
Enrique Pérez Estévez. Sarriá, 30, Zona 17. Madrid-20.

*Rafael DEVIS*

## NIA SAMIDEANO PETRO POLIŜĈUK JUBILEAS

La 3-an de marto festos la ses dekan datrevenon de sia naskiĝo, nia kara amiko Petro Poliŝĉuk, Delegito de U.E.A. en Taŝkent (Sovet-Unio). Aktiva esperantisto de antaŭ kvar dek jaroj, tutcerte li ricevos multajn gratulojn okaze de sia jubileo.

Lia nomo estas tre konata de la hispanaj esperantistoj ĉar kelkfoje liaj tradukaĵoj aperis sur la paĝoj de "Boletín".

Koran gratulon kaj grandajn sukcesojn ni deziras al nia soveta amiko.

## deziras korespondi...

POLLANDO. — Gdansk-1, Skrytka 254, S-ro Andre Marszatkowski. Kiu deziras korespondi kun 15-17 jaraj knabi noj el Pllando, bonvolu skribi al la instruisto. Supra adreso.

# FONDUSO ESPERANTO

Unu plian fojon nia Honora Prezidanto de H.E.F., Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo kaj lia edzino S-ino Pilar Rebullida, elmontris sian sindediĉon kaj amon al Esperanto.

Ĉifoje estis pere de donaco al Fonduso "Esperanto" por la kreo de

*Premio Sancho-Rebullida*

Kiam la 3-an de januaro la Patronaro de la **Fonduso** celebris **kunvenon** por transcedi la **Prezidantecon** de la Patronaro al la nova Prezidanto de H.E.F., D-ro Sancho Izquierdo donis al la administranto de la Fonduso, S-ro Víctor Ortíz, la dokumentojn kiuj certigas la **kapitalon** por la premio.

Tiun premion oni aljuĝos ĉiun duanjaron kaj pro deziro de la donacintoj ĝi povos esti aljuĝita al bona lernanto, propagandisto, verkisto, tradukisto aŭ alia, laŭ la bontrovo de la Patronaro.

Gesinjoroj Sancho-Rebullida nur deziras lasi rememoron de sia amo al Esperanto pere de tiu premio kies nomo unuigas la familiajn nomojn de la geedzoj.

De la paĝoj de "Boletín", mi dankas al Gesinjoroj Sancho-Rebullida ilian sindonemon al nia nobla idealo.

INES GASTON

*Sekretariino de la Patronaro de*
*Fonduso "Esperanto"*

## F-INO KIMIE OZAWA ĈARMIS LA FRANCAJN KATALUNOJN

De la 2-a ĝis la 7-a de januaro 1970, La Kultura Esperanto-Centro de Perpignan (Pyrénées-Orientales) akceptis F-inon Kimie Ozawa, juna japanino el Tokio, kiu uzas esperanton por prezenti, en Eŭropo, revolucian kalkulaparaton por blinduloj "Soroban".

Krom du privataj demonstracioj kiujn ŝi faris ĉe la blindulaj societoj de Perpignan, sub la aŭspicioj de la Kultura Esperanto-Centro, F-ino Ozawa partoprenis publikan prelegon, organizitan de la Politeknika Asocio de Perpignan, kies ĉefa aganto estis S-ro René Benazet, alia samideano, kiu prelegis pri Finnlando, Laponujo kaj U. K. de Helsinki.

Televido, Radio kaj gazetoj favore raportis pri la manifestacioj, ĉu ĉe la blindulaj societoj, ĉu ĉe la Politeknika Asocio.

Ni ĝojas pri la restado en Perpignan de F-ino Ozawa ĉar dank' al ŝia rideto kaj ŝia scipovo de nia lingvo (S-ro René Llech-Walter, Honora Prezidanto de U.F.E., tradukis franclingve ĉiujn klarigojn) la publiko komprenis ke esperanto ne estas stultaĵo. La rezulto estas ke du novaj kursoj malfermiĝis la 15-an de januaro en nia urbo.

Korajn dankojn al nia japana samideanino.

*René LLECH-WALTER*

**NEKROLOGO**

## Douglas F. Murphi

La 2-an de januaro mortis S-ro Douglas Murphi, Prezidanto de Skolta Esperantista Ligo.

La morto de tiu veterana skolto esperantista, estas grava perdo por la Skolta Esperanto-movado. En pasinta numero de "Boletín" aperas la foto de nia elstara samideano akompanate de S-ro Pedro Marqueta.

Nian sinceran kondolencon por lia familio kaj por la estraro de S.E.L.
PACAN RIPOZON AL LI!!!

Ni estas vere kortuŝitaj ĉar okaze de nia eksiĝo kiel estraranoj de H.E.F., multajn leterojn ni ricevis same ĉe D-ro Sancho Izquierdo, kiel en la estinta Sekretariejo de nia Federacio; en ĉiuj, niaj karaj samideanoj kaj amikoj esprimas sian bedaŭron pro nia ĉesigo en la estraraj postenoj kaj dankas nin pro nia laboro.

Vere belegaj leteroj estas tiuj, kiujn ni ricevis, kaj, kiujn ni tutkore dankas; sed, inter ili, estas letero ricevita de D-ro Sancho Izquierdo, kiun —post ricevo de la koncerna permeso de nia estinta Prezidanto—, mi publikigas.

D-ro Lapenna per mallongaj frazoj, rekonas la grandajn meritojn kaj kapablojn de nia Honora Prezidanto, kio ne estas miriga fakto; por bone taksi la meritojn de Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo, oni bezonas havi similajn kapablojn kaj sindediĉon kiel li, aŭ kunlabori kun li kiel ni kunlaboris.

*Inés GASTON*

---

La 9-an de januaro 1970.

Al S-ro Prof. Miguel Sancho Izquierdo
Torre Nueva, núm. 30
Zaragoza

Tre estimata Sinjoro Profesoro, kara Amiko:

Mi tutkore dankas al vi pro via letero de la 18-a de decembro kun la gratuloj okaze de 60-a datreveno de mia naskiĝo. Viaj bondeziroj estis por mi aparte kortuŝaj, ĉar mi bone konas viajn grandajn meritojn por la Hispana Movado kaj viajn kontribuojn al la Tutmonda. Malofte oni trovas personojn sur tiel alta pozicio, kiuj restas fidelaj al siaj idealoj de la junaĝo dum tiel longa tempo.

Kompreneble, mi tre bedaŭras ke vi forlasas la oficon de Prezidanto, sed aliflanke komprenas, ke via alta aĝo ne permesas al vi aktive okupiĝi pri la gvidado de la Hispana Federacio. Mi kore dankas al vi pro via ĉiama subteno al progresemaj ideoj interne de Universala Esperanto-Asocio, kaj pro via subteno en la klopodoj progresigi Esperanton ĉie en la mondo.

Bonvolu akcepti, kune kun via altestimata edzino, miajn tre varmajn bondezirojn por la Nova Jaro, kun koraj salutoj.

Sincere via

Subskribita:
*Dr. Lapenna*

---


## LA VOĈALBUMO DE ESPERANTO

(1) Kiel pereis la familio de D-ro L. Zamenhof
Mag. Isaj Dratwe, Israelo

(2) Mi salutas al vi el Hispanujo.
Prezidanto: D-ro Miguel Sancho Izquierdo, ĉe H.E.F.
kaj F-ino Inés Gastón Hispanujo

AMO - AKADEMIO

Parolas ankaŭ nia samideano S-ro Nicolás López Escartín, Zaragoza.

Plasta gramofondisko, prezo 50 ptoj., aĉetebla ĉe Libroservo de H.E.F.
Paseo Marina Moreno, 35, 4.° dcha., Zaragoza.

# Asturias

Celo de la hispanaj esperantistoj por la jaro 1970



Asturias, ĉe la bordo de la Kantabra maro estas —eble— la plej montara regiono de Hispanujo. Krutaj altaĵoj kiel "Los Picos de Europa", "El Sueve", "Pajares"... altegaj pintoj, ĉiamaj neĝoj surmontaj, valoj ridetantaj kies verda koloro akiras nuancojn neimageblajn, densaj arbaroj kaj arbaretoj konsistantaj el ĉiuspecaj fruktarboj... ĉio ĉi konsistigas tiun belegan regionon, kiun la kongresanoj vizitos okaze de nia Hispana Kongreso de Esperanto okazonta en Mieres, tiu interesa urbo mondkonata pro sia industrio.

Unu el la plej belaj lokoj de Hispanujo estas Covadonga, deklarita Nacia Parko. Grandioza spektaklo de brava naturo, fama intermonto en kiu la pejzaĝo impona, grandioziĝas pli kaj pli dum la valo mallarĝiĝas ĝis loko kie ĝin fermas altegaj roktranĉaĵoj; ĉe unu el ĉi tiuj malfermiĝas la historia groto de Don Pelayo, kie la Sankta Dipatrino "La Santina" kiel ŝin nomas la asturianoj estas kultata kiel dieca reĝino de la asturianoj.

Oviedo, ĉefurbo de la iama Princlando Asturias, estas tre bela kaj interesa urbo kun grava Universitato, pri kiu ĉiuj asturianoj fieras; ĝi estas moderna urbo kun larĝaj stratoj kaj vastaj placoj kie belaj palacoj kaj monumentoj parolas pri gloraj historiaj epokoj. Ĝiaj parkoj ĉiam verdaj estas vere mirindaj.

Gijón, industria urbo, kuŝas ĉe la bordo de la maro, ĝia grava haveno "El Musel" estas de ĉiuj konata kaj eble la plej kantata de popolaj poetoj. Ĝia bela strando kaj allogaj ĉirkaŭaĵoj faras la urbon ŝatata paradizo por la turistoj.

Villaviciosa, fama pro sia fabriko de cidro (pomvino) "El Gaitero" (La Sakflutisto). Laŭ informoj de niaj Mieresaj samideanoj ni havos okazon viziti tiun gravan industrion.

Ribadesella, Sama de Langreo, Pravia... estas ne necese ke ni daŭrigu, ĉiuj urboj kaj urbetoj de Asturias meritus specialan mencion, samkiel specialan mencion meritas ĝia tipa folkloro, kiun tutcerte la kongresanoj povos ĝui en ĝiaj plej variaj prezentadoj. La asturia kanto estas nekonfuzebla, tre harmonia kaj kies nekomparebla ĉarmo invitas daŭre aŭskulti ĝin.

Hispanaj esperantistoj: En Mieres, koro de Asturias okazos nia XXX-a Hispana Kongreso de Esperanto, kvazaŭ Jubilea Kongreso, per ĝi ni komencos la trian dekon de niaj naciaj kunvenoj; la Mieresaj esperantistoj kaj la Mieresa popolo atendas nin plej kore; ni devas respondi per nia ĉeesto al ilia gastameco, kaj samtempe, ni profitu la okazon viziti tiun grandan urbon, Asturias, ĉar kiel ununura urbo sin prezentas tiu interesa regiono de la norda Hispanujo, tial ke, krom la grandaj amasoj da konstruaĵoj: Oviedo, Gijón, Mieres... ĉie aperas pli malpli proksimaj loĝejoj kiuj unuigas la tuton.

*I. G.*

DAŬRIGO DE LA ANTAŬA LISTO

- Mondpercepto de la mod. natursciencoj ... 175,—
- Naciismo (Lanti) ... 30,—
- Natura nutrado (Ole Ramby) . 18,—
- Nova Testamento, La ... 78,—
- Nuna stato de l' evoluismo, La (J. Rostand) ... 53,—
- Papo Pio V beata (Halbedl) ... 42,—
- Pasko (Martinus) ... 94,—
- Polaj okcidentaj kaj nordaj teritorioj ... 30,—
- Polvo de l' morto (Pri atomprovoj, jap.) ... 18,—
- Populorum progressio (Encikliko, Paŭlo VI) ... 9,—
- Preparo al Diservo (Pastoraj notoj) ... 120,—
- Revolucia homo en la kosma epoko, La (Brooke) ... 5,—
- Sankta Biblio, La; lukse bind. 420 ptj., bind. ... 190,—
- Sankta Eŭkaristio (katolika) ... 20,—
- Sankta Meso (katolikaj liturgiaj tekstoj) ... 17,—
- Scienco kaj pseŭdoscienco (P. Neergaar) ... 12,—
- Sciencaj studoj (originalaj) ... 235,—
- Sekretoj de la marestaĵoj (P. Giunio) ... 100,—
- Sintrompoj (tr. Flammer) ... 30,—
- Skizo pri filozofio de la homa digno (Gille) ... 76,—
- Sorto de la homaro, La (Martinus) ... 94,—
- Spiritaj Ekzercadaj ... 15,—
- Studoj kaj klarigoj (katolika) . 22,—
- Studoj pri ameloj kaj legumenoj (S. Kawamura) ... 105,—
- Surtera paco, La (Encikliko, Johano XXIII) ... 50,—
- Totala suneklipso 1961 (Ljubiĉ k. Dirjanoviĉ) ... 36,—
- Verkoj de D-ro Nakamura ... 24,—
- Viktimoj de la atombombo (tr. Ĉ. Jui) ... 112,—
- Vojo (J. M. Escrivá de Balaguer) 140,—
- Vojoj de la eklezio, La (Encikliko, Paŭlo VI) ... 40,—

*Geografio, vojaĝado, foto-libroj*

- Balaton (Hungarujo, foto) ... 60,—
- Budapest (Hungarujo, foto) ... 60,—
- Burĝonoj (Setälä) ... 70,—
- De Parizo al la Lazura Marbordo (Rétot) ... 38,—
- De Parizo al la Pirenea Montaro (Rétot) ... 38,—
- Ekspedicio Kon-Tiki, La (Heyerdahl) ... 260,—
- Faktoj pri Danlando (ilus.) ... 30,—
- Feliĉigaj Ferioj (Esp-o-golfo Primoŝteno) ... 70,—
- Grezijono invitas vin ... 15,—
- Gvidlibro tra Paris (Julieta) ... 186,—
- Hungara nacia galerio (nigrablanka) ... 66,—
- Hungario sur bildoj (luksa, granda) ... 280,—
- Infanoj ne konas limojn (ĉiulandaj) ... 59,—
- Japanujo hieraŭ kaj hodiaŭ ... 24,—
- Kunprinclando A n d o r o, La (Bacquer) ... 115,—
- Nederlando (Poŝlibro kun fotoj) ... 70,—
- Ni vizitas la urbon Kraków (Polujo) ... 20,—
- Varsovio rekonstruita ... 110,—

DIVERSAJ VERKOJ LAŬ ALFABETA ORDO

- Arĝenta duopo. Baghy k. Kalocsay ĝis 1937 ... 60,—
- Bone! Majakovskij, rusa "poemo de l' oktobro" ... 15,—
- Dektria mortis, La. Vetter, germ. krimromano ... 92,—
- Dorse kontraŭ la muro. Wybenga, frisa, led-imite bin. 338 ptj. 198,—
- Eta princo, La. Saint-Exupéry . 220,—
- Frisaj rakontoj. 20 modernaj ... 120,—
- Koloroj, Baghy (1891-1967) orig noveloj ... 60,—
- La Lando de Alvargonzález, A. Machado, trad. F. de Diego ... 50,—
- Leteroj el mia muelejo. Daudet 20,—
- Nobla Korano, La ... 480,—
- Paroladoj kaj Prelegoj, Lapenna 220,—
- Preĝo, T. Jung, originala versaĵo 30,—
- Nova Antologio, Grabowski ... 25,—
- Rakontoj pri fantomspitantoj. Ĉinaj ... 25,—
- Sen eliro; La respektema p... Sartre ... 122,—
- Soleco, V. Catalá, trad. J. Ventura ... 300,—
- Sveda poemaro, tradukoj el 30 poetoj ... 90,—
- Trifoje akurate je la dekdua horo. Germ. romano ... 98,—
- Tri verkoj de Volter ... 174,—
- Vivo vokas. Engholm (1899-1960) bind. 120 ptj. ... 95,—

LERNOLIBROJ INTERNACIAJ KAJ POR HISPANLINGVANOJ

- Dialekto, dialektiko, Dalmau ... 40,—
- Du malsanoj en Esperanto, de Hoog ... 80,—
- Esperanto laŭ naturmetodo. 10 kajeroj entute ... 500,—
- Esperanto por infanoj. Solomon 36,—
- Esprimo de sentoj en Esperanto. Privat ... 30,—
- Fundamento de E s p e r a n t o, 5-lingva ... 255,—
- Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en E s p e r a n t o, Saussure ... 72,—

## PARLAMENTANOJ PRISTUDIS ESPERANTO-INSTRUADON

Kunlaboro inter la landaj asocioj de U.E.A. en Danlando kaj Pollando kondukis lastatempe al internacia diskuto pri Esperanto-instruado sur parlamenta nivelo. Dank' al propono de Centra Dana Esperantista Ligo, ĝustatempe komunikita ankaŭ al Pola Esperanto-Asocio, danaj parlamentanoj en oficiala vizito al Pollando aparte interesiĝis pri la instruado de Esperanto en polaj lernejoj. Kiel konate, Pollando estas unu el la landoj, kiuj ĝis nun plej multon faris en tiu direkto.

La grupo de danaj parlamentanoj alvenis laŭ invito de la pola parlamento. Gvidis la grupon parlamentanino s-ino Meta Ditzel, kiu mem siatempe instruis la Internacian Lingvon en Danlando. La danoj interesiĝis ĝenerale pri la kleriga sistemo de la alia lando, sed precipe petis informojn pri la loko de Esperanto en la lerneja programo. Rezulte, okazis speciala konferenco ĉe la Ministerio por Klerigo kaj Superaj Lernejoj, kun partopreno de altrangaj funkciuloj de la ministerio, la direktoro de la departemento por klerigo de plenaĝuloj, la fakestro pri lingvo-instruado en mez-lernejoj, la fakestro pri lingvo-instruado en universitatoj, inspektoro pri lingvo-instruado al plenaĝuloj, kaj la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio.

Laŭ la plej novaj informoj, Esperanto estas nun instruata en 91 lernejoj de Pollando. Nur antaŭ kelkaj monatoj aperis la nova oficiala programo de instruado de Esperanto, aprobita de la ministerio kaj eldonita de la ŝtata eldonejo.

---


Fundamenta prononco (gramofondisko, japana) ... 30,—
Junulkurso Ilustrita. S. A. T. ... 100,—
Junulkurso Ilustrita. S.A.T. 5 diskoj, 2-flankaj ... 175,—
Jamborea Lingvo ... 50,—
Konversacia Esperanto - kurso (Szilágyi) ... 80,—
Lingvaj respondoj. Zamenhof, kun komentario de Waringhien, bind ... 150,—
Lingvo, Stilo, Formo. Studoj de Kalocsay ... 76,—
Naŭlingva Etimologia Leksikono. Bastien, bind ... 150,—
Ne tiel, sed tiel ĉi! Faulhaber. Pri stilo ... 75,—
Internacia elparolo. 5 nacioj, gramofondisko kun multoblig. Teksto ... 34,—
Perfekta prononcado I-II gramofondiskoj, po ... 60,—
Plena Gramatiko, Vol. II ... 222,—
Privilegia Vojo. Setälä ... 65,—
Elementos de Esperanto. Soler 10,—
Esperanto al alcance de todos, Soler ... 50,—
Gramática de Esperanto y Vocabulario, Anglada ... 40,—
Gramática de Esperanto y Vocabulario, Bremón ... 75,—
Iniciación al Esperanto, Crespo Cano ... 100,—
Lernolibro de Esperanto, Mimó 70,—
Manual de Conversación Esperanta, Bremón ... 25,—
¿Sabe Vd. Esperanto? H. Hess (edición argentina) ... 60,—
Primer Manual de Esperanto (para catalanes) ... 15,—
Diccionario Elemental Esperanto-Español, Español-Esperanto, Tudela ... 15,—
Vocabulario Español-Esperanto, Tudela ... 145,—
Vocabulario Esperanto-Español, Tudela ... 75,—
Lexicón Sopena, vocabulario esp.-hisp., hisp.-esp. (gramática, alfabeto y pronunciación). Paluzie ... 20,—
Katolika Terminaro Esperanto-Español. J. M. Claramunt Sch. P. 28,—
Plena Vortaro de Esperanto ... 280,—

Krom la gramofondiskoj pri prononcado, anoncitaj inter la Lernolibroj, ni liveras ĉiujn diskojn ekzistantajn, sed, notu bone: Alsendo de rompeblaj diskoj okazas sole je la risko de la mendantoj.

Se vi deziras iu ajn libron kiu ne aperas en niaj listoj, mendu ĝin ankaŭ, ni klopodos kontentigi vin.

LIBROSERVO DE H.E.F.

Mendoj kaj pagoj ĉe Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.°, Zaragoza.

Unu plian fojon la hispanaj esperantistoj festis la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Niaj samideanoj de Bilbao, Madrid, Sabadell, Valencia, Valladolid kaj Zaragoza sendis raportojn pri la diversaj festoj kaj festetoj honore de nia Majstro.

BILBAO

La Esperanto-Grupo de Bilbao okazigis kelkajn festetojn por inde omaĝi la memoron de nia kara Zamenhof, la genia elpensinto de la internacia lingvo.

Dimanĉon, la 14-an ni ĉeestis meson en la najbara Baziliko-Katedralo de l' Sinjoro Santiago kaj post interkonatiĝo je la fino de l' religia servo, ni iris en la Grupejon kie diligentaj gesamideanoj ordigis tablojn kaj seĝojn kaj pretigis lunĉon por la ĉeestontoj.

Post la 12,30 h. komenciĝis la anoncita koncerto fare de nia tre konata kaj amikeca "Polifónica Euskalduna" kiu nin regalis per disaŭdigo de rusaj, kantabraj kaj vaskaj melodioj kiujn varme aplaŭdis la ĉeestantaro. Je la fino de l' koncerto la geĉeestantoj ekstaris por kanti du strofojn de la Esperanta Himno.

Je la 14,30 h. kaj post la lunĉo, kelkaj konataj gesamideanoj iris en la popolan Restoracion "Urkia" por komuna interfratiga tagmanĝo kiun spicis diversaj spritaĵoj, rilate la ata/ita-aferon, la vegetaremon kaj la "pacemon" de la direktantoj de diversaj civilizitaj kondukantoj de ne malpli civilizitaj popoloj.

Post la tagmanĝo venis en la Restoracion aro de simpatiaj gejunuloj por trinki kafon, fumi kaj paroli pri vegetarismo k. a. "ismoj" samkiel por plani diversajn estontajn agadojn.

Je la 16,30 denove ĉiuj kunvenis en la Grupejo kie oni aranĝis tre brilan balon kiu daŭris ĝis la 11-a nokte.

Lundon, la 15-an je la 8,30 h. vespere, okazis la t.n. "Ronda Tablo" laŭ aranĝo de nia Prezidanto S-ro Juanes. Samideanoj Ronda, Bringas kaj Otaola respondis ĝis 31 demandojn, laŭ bontrovo de S-ro Juanes, pri: Zamenhof, Vivo kaj idealoj, Interna Ideo, Esperanto en la nuna mondo, La Esperanto-Kongresoj, Vivanteco de Esperanto, ktp.

Tuj poste oni metis la verdan stelon sur la bruston de l' novaj gelernantoj kun finparoloj de la Prezidanto.

Mardon la 16-an kun ioma prokrasto pro difektiĝo de du elektraj lampoj okazis la senpacience atendata prezentado de diapozitivoj fare de nia eminenta fotografo S-ro Angel Bolaños Martínez. Ravajn, bone elektitajn bildojn ni vidis sur la ekrano. Belajn multkolorajn florojn, Imponajn montojn (Picos de Europa kaj Pirenea Montaro), Monasterio de Piedra kun la vivantaj facilmovaj trutoj, tamen ne manĝeblaj. Belaj kaskadoj kaj akvofaloj. Ravaj promenejoj...

Merkredon la 17-an okazis speciala programero prezentata de nia agema, dinamika gejunularo. Malferma paroladeto de F-ino María José Burgos, Komitatanino de nia Grupo. Bone legataj poezioj de nia nova lernantino F-ino Carmen Navarro, parolistino ĉe la loka "Popola Radio", prozaĵoj de F-ino Castro. Legado de tradukoj el Quijote fare de nia nova lernanto la juna araba studento S-ro Nassif, el Sirio, nuntempe studanta en Bilbao.

Ankaŭ ni havis interesan ekspozicion de poŝtkartoj kaj diversaj interesaj bildoj el Finlando, Estonio, Ĉeĥoslovakujo k.a. baltaj landoj. Ekspozicion de poŝtmarkoj —pm. faŭno— de Ĉeĥoslovaka, Pola kaj Hungara Respublikoj. Tiun-ĉi poŝtmarkan Ekspozicion aranĝis samideanoj Alberto Rodríguez Garmendía kaj José Efreu Sanz.

Ankoraŭ la vendredon —la 19-an— ni havis novan specialan lunĉon aranĝitan de nia nova gejunularo omaĝe al plenaĝuloj pri kies aranĝo mi, kiel maljunulo, estas tre dankema al ili. Ĉiuj aranĝoj, ĉefe tiu de l' dimanĉo, estis multnombre ĉeestataj. Oni povis kalkuli pli ol 60 gepartoprenantojn dum la dimanĉa aranĝo.

*L. de O.*

MADRID

La 15-an de decembro, kiel estas tradicie en nia movado, ankaŭ la Madrid-aj esperantistoj festis la cent dekan datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

La Madrida Esperanto-Liceo organizis komunan vespermanĝon en centra restoracio, kiun partoprenis esperantistoj kaj simpatiantoj, kaj kie regis interfrata amikeco.

Je la fino, kelkaj esperantistoj paroladis por honori la memoron de nia Majstro, kaj poste en amikeca babilado oni prezentis kaj pritraktis diversajn sugestojn por la bona funkciado de la asocio.

*Ibáñez*

SABADELL

*La Zamenhof-Festo en Sabadell*

Okaze de la datreveno de naskiĝdato de D-ro Zamenhof, la loka societo "Centro de Esperanto Sabadell" projekciis du kolorajn filmojn; unu pri la pasinta Barcelono-Provinca Esperantista Renkontiĝo en Les Fonts de Terrasa, kaj alian pri vojaĝo al Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki, ambaŭ filmitajn de S-ro Antonio Serrat. S-ro Luis Serrano, sekretario de C.E.S. inaŭguris la feston per tre trafa paroladeto en Esperanto, kaj tuj sekve S-ro Sala distribuis la librojn al la membroj de la Sekcio Rondo de Esperantistaj Libroamikoj. La Festo finiĝis per disaŭdigo de magnetofona sonbendo en kiun oni transprenis la rubrikon "Verdikto" de la Ŝtata Radiostacio "Nacia Radio de Hispanujo". En la interdiskuto intervenis la novaj H.E.F. —estraranoj, S-roj Figuerola Auque, González Aboín kaj Ibáñez Crespo, kiuj tre konvinke pledis por la Lingvo Esperanto.

*Velus*

VALENCIA

La Valencia Grupo de Esperanto celebris la cent dekan datrevenon de la naskiĝtago de D-ro L. Zamenhof per diversaj faroj, kiuj estis tre dense ĉeestataj.

Sabaton, la dekrian de Decembro, en centra restoracio kvindeko da grupanoj kaj lernantoj, gaje vespermanĝis. Je la fino, la juna lernanto de la Aldaja grupeto kiun gvidas samideano Saballs, Johano Rodolfo Tarantino, per trafaj vortoj esprimis sian kontentiĝon pro la partopreno en la festo kaj en la movado. Sekve, la Prezidanto de la Grupo, samideano J. Devís, per tre belaj frazoj, klarigis la veran esencon de Esperanto kaj laŭdis tiujn kiuj strebas por disvastigi ĝin. Konkretigante tiun laŭdon, li emfazis la persistan, trafan kaj meritan laboron de la instruisto S-ro



S-ro Devís Prezidanto de la Esperanto-Grupo de Valencia, montras la pergamenon per kiu la Valencia Grupo atestas sian dankon al S-ro Navarro, kiu pozas dekstre de D-ro Herrero.

Felikso Navarro Clemente, kiu, de longaj jaroj, instruas Esperanton al siaj lernantoj en la lernejoj de la "Patronato de la Juventud Obrera" preparante, tiel, novajn vicojn de junuloj por nia movado. La bela oratorado de la Prezidanto estis tre juste kaj forte aplaŭdata.

Per mallongaj frazoj, D-ro Herrero elstarigis la fakton ke la festo estis partoprenata de multaj gejunuloj, kiuj, en la estonteco, anstataŭos nin kaj daŭre penos por triumfigi nian idealon. Poste, li transdonis al S-ro Felikso Navarro, artan pergamenon, per kiu la Valencia Grupo atestas sian dankon pro lia farita laboro.

Kortuŝite, la omaĝito esprimis sian miron pri tiu publika danko, ĉar, laŭ li, li ne meritis ĝin, ĉar li nur faris sian devon, semante kaj semante daŭre. Li estis, plenmerite, tre aplaŭdata.

Dimanĉon, la dekkvaran. la katolikaj esperantistoj ĉeestis Meson por la mortintaj samideanoj. Ĝin celebris, esperantlingve, Patro Mikaelo Pujalte, S.J., nova esperantisto, kiu faris prediketon en Esperanto, en kiu li komentariis la paralelon inter Esperanto kaj Katolikismo. Dum la meso, la infanĥoro, gvidata de samideano Felikso Navarro, kantis diversajn meskantaĵojn.

Poste, la tuta ĉeestantaro, kaj pluraj samideanoj, sin turnis al la strato D-ro Zamenhof por kroni per laŭroj la steleon de la Fondinto. Dume, ĉiuj kantis la "Esperon".

Laste, multaj veturis al la valencia tombejo, por meti branĉeton de laŭro sur la tomboj de la mortintaj samideanoj kiuj atestis sian ĝismortan esperantistecon per verda stelo sur siaj tomboj.

Lundon, la dekkvinan, D-ro R. Herrero faris, en la Grupo, specialan lecionon por klarigi al la lernantoj la celojn kaj disvolviĝon de Esperanto, post mallonga klarigado de la vivo, penoj kaj streboj de D-ro Zamehof, por donaci al la Homaro tiun mirindan pacigilon kiu estas Esperanto.

Tiel, la valenciaj samideanoj celebris la cent dekan datrevenon de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof.

VALLADOLID

GRUPO ESPERANTISTA "FIDO KAJ ESPERO"

Como en años anteriores, el Grupo Esperantista de Valladolid celebró la fiesta del Dr. Zamenhof brillantemente y con gran entusiasmo por parte de todos los asistentes.

El sábado, día 14 de diciembre, se celebró en el domicilio social, a las 8 de la noche, una conferencia en Esperanto en la que el Presidente del Grupo, señor Gil Contreras se dirigió a los asistentes recordando el ambiente de fraternidad que se respira siempre en los encuentros entre esperantistas, en los Congresos, etc., y cómo la juventud es el porvenir del movimiento Esperantista, citando a este respecto las palabras del Dr. Lapenna quien dijo: "Si la juventud es el futuro del mundo, lo es también del movimiento esperantista, y si quiere crear un mundo mejor, los jóvenes esperantistas también quieren crear un mundo mejor que los anteriores esperantistas." El señor Gil Contreras terminó su disertación animando a los presentes a trabajar por un ideal de paz. Al final de la conferencia, el Presidente fue muy aplaudido, sirviéndose a continuación un vino español.

El domingo, a las 12 de la mañana, los esperantistas asistieron a la Santa Misa oficiada por don Jonás Castro, sacerdote esperantista, en la iglesia de Santa Ana. A la salida se hizo una foto en común.



A la salida de la Misa en la Iglesia de Santa Ana, miembros del Grupo de Valladolid posan para BOLETIN

Con gran entusiasmo los asistentes se dirigieron al domicilio social, donde se sirvió un aperitivo. Finalmente 30 socios y simpatizantes se reunieron en fraternal comida en el Restaurante "La Rosaleda".

Los actos del presente año finalizaron en el salón de actos de la Escuela de Maestría Industrial, con una amena charla en castellano acerca de la obra del Dr. Zamenhof y sus frutos en el campo cultural principalmente, a cargo del socio don Mauro López Nalda. En su charla destacó la realidad universal del Esperanto como un hecho internacional, para la formación de una comunidad universal, así como los idiomas nacionales forman la realidad nacional. Citó a U.E.A. como ejemplo de internacionalidad, siendo la única organización no estatal en la que figuran miembros de las cinco partes del mundo. Seguidamente aludió a la necesidad actual de conocer muchos idiomas, lo cual no está al alcance de todos, de ahí la necesidad de uno universal, no pudiendo ser ninguno nacional ya que cada nación desearía imponer el suyo, y de ahí que el Esperanto sea el más idóneo.

El señor López Nalda fue muy aplaudido por su brillante disertación, proyectándose a continuación la película en color "Renkonto kun Fiat".

De estos actos dieron amplia información la Prensa y Radios locales, publicándose el día 15 en el "Norte de Castilla", un artículo sobre Valor cultural del Esperanto", del socio de nuestro Grupo, señor Hernández.

*M. R. Urueña*

ZARAGOZA

La esperantistoj de Zaragoza por festi la datrevenon de la Fondinto organizis —kiel jam tradicie—, publikan prelegon en solena kadro de "Institución Fernando el Católico" Provinca Palaco.

Ĉiuj tagĵurnaloj kaj radiostacioj de Zaragoza anoncis la eventon.

La 15-an vespere la esperantistoj kunvenis en la Societo "Frateco", kie estis inaŭgurita tre interesa Ekspozicio ĉefe bibliografia. Ĉar la Ekspozicio —kvankam en la klubejo—, estis publika, ĝi estis tre vizitata.

La 20-an, je la sepa vespere, S-ro Pedro Marqueta, en plenplena salono, prelegis pri Esperanto, lingvo kaj ideo. Lingvo; facila interkomprenilo por ĉiuj homoj. Ideo; paco kaj amo, Frateco.

Li rakontis al ni kiamaniere li kaj familio spertis tiun senton de frateco dum sia vojaĝo tra la Balta Maro, kaj prezentis filmon kaj diapozitivojn per kiuj li pruvis al la neesperantista publiko kiamaniere ili estis akceptataj en ĉiuj landoj de la tieaj samideanoj, pro kio ili multe pli ol la ceteraj kunvojaĝantoj povis ĝui la vojaĝon ĉar ili ĉie estis en familia medio.



Esperantistoj de la Grupo Frateco pretigas la Ekspozicion

Forta aplaŭdo premiis la disertacion kaj filmprezentadon de S-ro Marqueta.

Post la fino la esperantistoj translokiĝis al fama Restoracio por kune vespermanĝi. Sento de interfrata amikeco regis dum la festo kiu finiĝis post la noktomezo kaj kiun partoprenis pli ol kvindek samideanoj.

*Fratecano*

## MALFERMITA LETERO

Altestimataj kaj karaj Gesamideanoj:

Per ĉi tiu malfermita letero, kiun mi sendas al vi ennome de la nederlanda misiisto F. M. Schlooz S. D. B., ĝenerala direktoro de "Beatitudes Social Welfare Centre", mi aldonas al vi kelkajn ekzemplerojn de "Himno de Amikeco" kaj de "Himno de la Eŭropaj Federistoj", por ne komerca, sed nur bonfara celo. Laŭ nuraj pres-elspezoj ĉiu ekzemplero kostas ĉirkaŭ 8 usonajn centimojn, t.e. 1 dolaron por 12 ekzempleroj, krom afranko.

Cele al praktika efektivigo de la Homaj Rajtoj kaj evoluhelpo, precipe rilate la plej bezonantajn hindajn leprulojn, mi invitas vin antaŭ via proksima somerferio: Donu al tiuj malfeliĉuloj vian helpon; kontribuu dum la tiel nomata "Monato de Universala Frateco" por la konstruota pavilono "Esperantista Frateco" en Madras!

"Nenio pli bela ol mondkolekti por la karito."

"Per lerta admono alfluas la mono."

Organizu, ne gravas ĉu grandan aŭ malgrandan, monkolekton inter viaj geamikoj, memorigante al ili, ke "terura ĝemveo leviĝas inter la miloj da madrasaj lepruloj" laŭ la vortoj de M. F. Schlooz; kaj ke tiaj sufero, forlaso kaj mizero ne plu estas permeseblaj inter civilizitaj modernaj homfratoj.

Interalie ni ankaŭ kolektas paperaĵojn, feraĵojn, cifonojn kaj ĉiuspecajn antikvaraĵojn por tiu ĉi urĝa celo.

Vian frataman monoferon bonvolu sendi al kasisto de la konstruota pavilono:

D-ro C. C. Ferrari. Viale dei Mille, 37. Poŝtĝirkonto 3-7791. 20.129 Milano (Italia)

aŭ al mia nova adreso:

Petro M. Urbaitis. Piazza S. Maria Ausiliatrice, 54. 00181 Roma (Italia)

aŭ eĉ rekte al:

F. M. Schlooz. Vyasarpady (Bag 701). Madras 12 (Hindujo).

Dezirante al vi tre belan, meritintan somerferion, kun koraj salutoj kaj anticipitaj dankoj, mi restas en Kristo kaj en Homaro frate via.

*Petro M. URBAITIS*

IIª INTERNACIA

ESPERANTO - RENKONTIĜO

okazonta en JACA (Ĥaka)

27-29 junio 1970



JACA (Ĥaka) SUR LA VOJO

AL SANTIAGO

Unua ĉefurbo de la militema Regno de Aragón, Jaca estas ŝlosilpozicia urbo en la Alta hispana Mezepoko. Ĝia privilegia situacio de vojkruciĝo inter la Vojo al Santiago kaj la antikva Pasejo de l' Bearn al Zaragoza, pasejo de la francaj kruckavaliroj al la Ebro, kaj de la arabaj komercistoj al Francujo, faras de Jaca krisolon de kulturoj kaj centron de la mezepokaj civilizacioj. Ĝia katedralo estas majstra monumento de la tielnomata arto de l' Vojo al Santiago. Ĝia urbodomo, grava elmontro de la Aragona stilo, estas harmonia verko de la XVI-a jarcento.

En tiu ĉi interesa urbo, organizita de Hispana Turisma Esperanto-Sekcio de H.E.F. interkonsente kun "Frateco", Esperanto-Societo de Zaragoza, okazos la II-a Internacia Renkontiĝo de francaj kaj hispanaj esperantistoj.

Prezidos la Renkontiĝon kaj bonvenigos la partoprenantojn la Prezidanto de "Frateco" kaj Honora Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo; partoprenos ĝin D-ro André Albault, Prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto, kaj S-ro Angel Figuerola Auque, Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kiuj la 28-an, dum la oficiala aranĝo salutos nome de la francaj kaj hispana esperantistoj respektive. Festparolado estos de S-ro Fernando de Diego.

Provizoran programon ni prezentis en antaŭa numero de "Boletín". Antaŭvidite estas akcepto de la partoprenantoj en la Urbodomo, la 28-an tagmeze.

Ĉar eble estos esperantistoj kiuj ne povos partopreni ĉiujn aranĝojn, la prezon de la partopreno ni fiksis aparte, laŭ la tagoj; same kiel aparte ni prezentos tiun de loĝejo en la Universitata Restadejo.

Prezo de la partopreno al la aranĝoj de la 28-a (kiu inkluzivas la tagmanĝon kaj promenadon) estas fiksita je 250,— ptoj.

Prezo de tuttaga ekskurso al arbaro Oza: tagmanĝo, 150 ptoj, aŭtobuso, fiksota.

Ni fiksas aparte la prezon de la aŭtobuso por la tuttaga ekskurso ĉar povas esti samideanoj kiuj veturos per propra aŭtomobilo.

La prezo de duonpensiono en Universitata Restadejo (inkluzivas vespermanĝon, loĝadon kaj matenmanĝon), estas 185,— ptoj. tage ĝi inkluzivas ankaŭ servomonon.

Ricevas la aliĝojn kaj la monon: Hispana Turisma Esperanto-Sekcio de H.E.F. ĉe Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza (Hispanujo).

# FESTIVALO EN JACA (ĤAKA)

*T. Asiain*

Ankaŭ mi iros al Ĥaka
al Festival', al Festival'.
Ankaŭ mi iros al Ĥaka
kun mia tuta animo en la kantad'.
Ni vivu ĉiam kune
en densa, streĉa fask',
ni klopodu por vivadi
kun fratec' amo kaj pac'.

Ni estas kanzonoj
amo dezir'
ni estas mesaĝo
de la iluzi'.
Mi venas Ĥakon
portante jen,
kanzonon, fidon, laĉojn de amikec',
l' adiaŭ, nur promeso de reven'.

Blankegaj montoj
kaj panoram'
verdaj herbejoj
funde la val'.
La Pireneoj
kuniga pont',
krisol' de lum' de neĝo kaj de sun',
la eĥon gardos ja de mia voĉ'.

Ankaŭ mi iros al Ĥaka
al Festival', al Festival'.
Ankaŭ mi iros al Ĥaka
kun mia tuta animo en la kantad'.
Ni vivu ĉiam kune
en densa, streĉa fask',
ni klopodu por vivadi
kun fratec' amo kaj pac'.

Kun fratec' amo kaj pac'.

---

Ĉiuj partoprenontoj ricevos siatempe la muziknotojn.

*Balance en* 31 *de diciembre de* 1969.

COBROS

| | | | |
|---|---|---|---|
| Superávit en 31 de diciembre de 1968 ... ... | | 8.783,— | |
| Cotizaciones y complementos voluntarios cotización ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 73.903,— | | |
| Cotizaciones de extranjeros ... ... ... ... ... | 2.608,— | | |
| Donativos ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 18.755,— | | |
| Venta de material y derechos de examen . | 475,— | | |
| Intereses Libreta Caja de Ahorros ... ... ... | 86,— | | |
| Superávit Congreso de Canarias ... ... ... | 7.055,— | | |
| Superávit Congreso Universal ... ... ... ... | 16.532,— | | |
| Subvención Ministerio E. y C., para ayuda gastos administrativos de H.E.F. con motivo del Congreso Universal ... ... | 14.650,— | 134.064,— | 142.847,— |

PAGOS

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Boletín:** | | | |
| Composición e impresión ... ... ... ... ... | 63.262,— | | |
| Fotograbado ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 10.128,— | | |
| Sobres ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 1.732,— | | |
| Gratificación al señor Director ... ... ... | 1.000,— | | |
| Campaña de Navidad ... ... ... ... ... ... | 250,— | 76.372,— | |
| Cuota a U.E.A. ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 3.920,— | | |
| Complemento cuota a U.E.A. año 1968 ... | 468,— | | |
| Informaoficejo ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 2.000,— | | |
| Información y propaganda ... ... ... ... ... ... | 4.832,— | | |
| Papel, sobres, postales y otro material escritorio ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 1.093,— | | |
| Modificación del Reglamento e impresos varios ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 799,— | | |
| Sellos de Correos y telegramas ... ... ... ... | 6.789,— | | |
| Libro de Actas ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 80,— | | |
| Tasas Gobierno Civil y Pólizas ... ... ... ... | 63,— | | |
| Fotocopias ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 100,— | | |
| Limpieza y arreglo máquina de escribir ... | 454,— | | |
| Carteles Semana Amistad Internacional ... | 1.438,— | | |
| Derechos de Aduana película Casa Fiat ... | 450,— | | |
| Libros regalados ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 540,— | | |
| Gastos homenaje Dr. Régulo ... ... ... ... ... | 2.510,— | | |
| Portes material a Canarias y obsequio a los congresistas ... ... ... ... ... ... ... ... | 3.500,— | | |
| Lotería ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 200,— | 29.236,— | 105.608,— |

## *RESUMEN*

| | |
|---|---|
| SUMA EL ACTIVO ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 142.847,— |
| SUMA EL PASIVO ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 105.608,— |
| *Saldo* ... ... ... ... ... ... ... ... | 37.239,— |

| | | |
|---|---|---|
| *Saldo anterior* ... ... ... ... ... ... | | 37.239,— |
| A DEDUCIR: | | |
| 5 por 100 sobre saldo anterior para la Fundación según la cláusula establecida en su Reglamento ... | 1.862,— | |
| Reintegro a Libroservo de las cantidades anticipadas de años 1965, 1966 y 1967 ... ... ... ... ... ... ... | 31.347,— | 33.209,— |
| *Saldo definitivo S. E. u O.* ... ... | | 4.030,— |

Nun, kiam mi forlasas la oficon de Kasistino de H.E.F., mi deziras per mia adiaŭo, sincere danki vin pro via komprenemo, ne nur pro mia laboro neniam plej bone nomata modesta, sed speciale mi dankas al tiuj, kiuj esprimis sian rekonon al la laboro de la tuta estraro kaj ĉefe al tiu de niaj Prezidanto kaj Sekretariino.

Samtempe mi petas senkulpigon, ĉar mi ne respondis al ĉiuj persone, sed la manko da tempo estas mia plej granda malamiko kiu ne permesis ke mi tion faru.

Koran dankon kaj plej samideanan saluton.

*María Pilar GOMEZ*

## AVISO

En la página 12 del pasado número de "Boletín", en el párrafo 4, línea 3, escrito en bable, dice: "agora voy pa casa a ponei una *cantesa* curiosa..."

En la traducción al final de la página quedó con unos puntos, el lugar de la palabra *cantesa* y su calificativo, por no haber recibido la traducción exacta.

Cantesa = Fleje que se pone alrededor de las almadreñas cuando éstas se agrietan, para reforzarlas.



**Amikeco trans limoj**

## *SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO*

*( S. I. A. )*

*Okazonta de la 22-a ĝis la 28-a de Februro* 1970

Same kiel en ĉi tiu numero de "Boletín" aperas ĉiuj raportoj pri la Zamenhof-Tago, en numero marto-aprilo aperos ĉiuj raportoj pri la aranĝoj organizitaj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Mi petas al ĉiuj raportontoj bonvolu sendi la raportojn kiel eble plej baldaŭ tuj post la Semajno. Koran dankon!!!

Poŝtkartoj kun la emblemo de la Semajno, "amikokartoj", ankoraŭ restas je via dispono, se vi ankoraŭ ne mendis, mendu ilin tuj. Prezo: 10 ptoj. deko.

Mendoj kaj pago, ĉe Libroservo de H.E.F. Marina Moreno, 35, 4.°, Zaragoza.

# LIBROSERVO
# HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
# ZARAGOZA

## RESUMEN DE CUENTAS DE LIBROSERVO DE H.E.F. - 1969

| | |
|---|---|
| Cobrado de libros, etc. | 77.060,— |
| Pagado de libros, e tc. | 57.266,— |
| *Beneficio* | 19.794,— |
| Gastos generales | 779,— |
| Beneficio líquido | 19.015,— |

---

## RESUMEN DE CUENTAS DE LIBROSERVO DE H.E.F.

Años 1965-1966-1967-1968-1969

| | |
|---|---|
| Beneficio líquido, año 1965 | 9.776,— |
| Beneficio líquido, año 1966 | 7.534.— |
| Beneficio líquido año 1967 | 14.040,— |
| Beneficio líquido, año 1968 | 18.627,— |
| Beneficio líquido, año 1969 | 19.015,— |
| *Total* | 68.992,— |
| Gastado para establecer la Fundación "Esperanto", según certificación | 56.405,70 |
| *Saldo* | 12.586,30 |
| Cobrado de libros traídos de Valencia años 1965, 1966, 1967, 1968, 1969 | 22.579,— |
| *Valor existente en libros* | 35.165,30 |

Zaragoza a 27 de diciembre de 1969.

*Inés GASTON*

# ELDONA-FAKO
# HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
# ZARAGOZA

## RESUMEN DE CUENTAS DE LA ELDONA-FAKO DE H.E.F. — 1969

| | | |
|---|---|---|
| Capital a amortizar | | 5.288,— |
| GASTADO: | | |
| Material diverso | 20.565,30 | |
| INGRESADO: | | |
| Venta material | 12.518,— | 8.047,— |
| Debe la Eldona-Fako | | 13.335,— |

Zaragoza a 27 de diciembre de 1969.

*Inés GASTON*

# COMENTARIO

Al cumplirse nuestro mandato como directivos de la Federación Española de Esperanto —aun cuando por nombramiento de la Junta General continúo al frente de estos servicios—, quiero hacer resumen de ellos a la vez que presento sus cuentas.

Las cuentas de Libroservo no creo haga falta comentarlas, porque claramente se refleja en ellas la marcha del servicio. Cuando éste fue trasladado a Zaragoza, no había "activo" para comprar libros y organizar el servicio, la Libroservantino fue quien adelantó el dinero necesario para ello; había unos cuantos libros traídos de Valencia que se han ido vendiendo y de los que alguno queda.

Con el beneficio sacado durante estos cinco años, se ha establecido la Fundación "Esperanto" y ha quedado un remanente que, unido a lo cobrado de los libros traídos de Valencia, hace que haya un "activo" existente en libros de 35.165,30 pesetas.

Mucho ha habido que trabajar para alcanzar este resultado, y una vez más doy las gracias a quienes adquiriendo sus libros por medio de Libroservo de H.E.F., lo han hecho posible. Esperemos que ahora se pueda pronto lograr que todos los libros existentes en Libroservo, sean propiedad de la Federación.

Las cuentas de Eldona-Fako (Sección Editorial), son todavía más sencillas aunque deban ser explicadas por si alguno no las comprende, sólo por el resumen.

Esta sección la creamos en 1964, figurando en los Estatutos de H.E.F., desde 1965, cuando éstos fueron adaptados a la nueva Ley de Asociaciones.

Su fundación se hizo —como siempre he dicho— muy modestamente, con un capital inicial de 37.732,90 pesetas que se invirtió en material (folletos, postales, insignias, banderines, etc.), para mediante su venta, recaudar fondos que permitieran aparte de ayudar a la labor informativa, estimular en su labor a los esperantistas, por medio de premios o editando trabajos.

Cada año he ido presentando en "Boletín" el resumen de cuentas, resumen que a simple vista siempre ha presentado un déficit, ya que en cuanto había algún pequeño remanente en Caja, he vuelto a adelantar el dinero necesario para la edición de lo que hemos considerado más interesante para los fines por los que fundamos esta sección; pero hoy puedo decir, que aparte de haber pagado de su Caja 2.945 pesetas en premios y 30.024 pesetas para la edición de folletos o traducciones de folletos de Turismo, la sección tiene en existencias un valor aproximado de 30.759 pesetas en diversos objetos, más 69.880 pesetas correspondientes al valor en venta de:

644 ejemplares de "Eterneco" (Navarra legendo), de Amalia Núñez Dubús.

648 ejemplares de "Filozofio de Fantomo", de W. Fernández Flórez, trad. de Luis Hernández.

880 ejemplares de "La Lando de Alvargonzalez", de A. Machado, trad. de Fernando de Diego.

No se puede precisar el valor de los libritos y objetos ya que a *Libroservoj*, etc., hay que hacerles los correspondientes descuentos.

He querido con esta explicación, aclarar que aun cuando en el resumen de cuentas figura un pequeño déficit, éste queda sobradamente cubierto con el valor en existencias, por lo tanto es de esperar que al darse cuenta los federados del funcionamiento de esta sección, y debido a las ediciones de los mencionados libritos, las ventas se incrementen y pronto pueda desenvolverse la sección por sus propios medios y seguir editando como hasta ahora lo viene haciendo.

Zaragoza a 31 de diciembre de 1969.

*Inés GASTON*

# ESPERANTO EN LA ANTENA

Cuando al escuchar el espacio "Veredicto" de Radio Nacional de España, nos dimos cuenta de que era Esperanto el tema a tratar, nos alegramos, ya que "Veredicto" es uno de los espacios que con mayor interés se escuchan.

Enseguida pensé comentarlo en BOLETIN, para desde sus páginas, felicitar a los señores Figuerola, Ibáñez y González Aboín por sus acertadas intervenciones, aun cuando, como es natural, particularmente les felicité enseguida.

Esperé antes de escribir estas líneas a que, como prometió el presentador del espacio, se repitiera el mismo dedicado al Esperanto, para contestar a las preguntas formuladas por la señora Sanz y que quedaron sin contestación por falta de tiempo, pero las semanas pasan y el espacio no se ha repetido. Sin duda había demasiados anglófilos en aquella "Mesa redonda", a los que no interesaban las categóricas respuestas de nuestros amigos.

Muy bien estuvo en todo momento el presentador del espacio, al que hay que agradecérselo.

Las opiniones contrarias fueron las acostumbradas en las personas que no saben lo que es el Esperanto.

Entre las intervenciones de los no esperantistas, merecen mencionarse la del asesor médico y la del asesor religioso de Radio Nacional de España. La del primero, porque fue un ataque sistemático, en el que toda su fuerza de convicción la empleó en querer demostrar que con el Esperanto se pretende suprimir los idiomas nacionales, con lo que demostró su completa ignorancia acerca de nuestro idioma internacional. Pero yo me pregunto, si no tendremos los mismos esperantistas culpa de esta ignorancia acerca del fin del Esperanto, con ese empeño de meterlo en todo, sin recordar que el Esperanto fue creado para las relaciones internacionales, y que resulta no sólo ridículo, sino perjudicial, el que con pretexto de dar a conocer su existencia, se dirijan cartas o escritos en Esperanto a oficinas españolas, por esperantistas españoles, o viceversa.

La opinión del asesor religioso, más conocedor del asunto, fue la de que dada la necesidad de un idioma internacional ante las exigencias de la vida actual, el Esperanto es una buena solución para dicha necesidad.

La discusión fue muy entretenida, y lo mismo el señor Figuerola, entonces como Presidente del Liceo madrileño de Esperanto, hoy Presidente de H.E.F., que los señores Ibáñez y González Aboín, ambos actualmente directivos de nuestra Federación nacional, supieron en todo momento contestar a las preguntas y rebatir los ataques, presentando cada uno su punto de vista muy acertadamente en cada momento, por lo que de nuevo les felicito muy sinceramente.

Desde la Secretaría de la Federación, se volvieron a enviar a Radio Nacional de España, esta vez para el espacio "Veredicto", unos cuantos ejemplares del folleto "Bazaj faktoj..." del doctor Lapenna, en versión española, traducido por nuestro compañero señor López Escartín, "Hechos fundamentales de la lengua internacional Esperanto", para que pudieran distribuirlos entre los interesados.

*Inés GASTON*

"La Lando de Alvargonzález", de Antonio Machado, Traduko de Fernando de Diego. Pledo por la asonanco de Henri Vatre. Prezentas: La Tradukinto. Nova eldono de Hispana Esperanto-Federacio. 48 paĝoj. Prezo: 50 ptoj. aŭ egalvaloro.

Mendoj kaj pagoj ĉe Eldona-Fako de H.E.F., Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha., Zaragoza (Hispanujo).

VIENA, 1 - 8 AGOSTO 1970

Viaje organizado por la Sección de Turismo de la Federación Española de Esperanto en colaboración con Viajes Meliá.

30-7-70 Por la mañana, salida de Madrid o Barcelona en avión JET "T" a Ginebra. Una hora más tarde, aproximadamente, llegada a Ginebra. Cena y alojamiento en el hotel.

31-7-70 GINEBRA. Media pensión en el hotel.

1-8-70 GINEBRA. Desayuno en el hotel. Por la mañana, salida en avión JET "T" para Viena. Dos horas y media más tarde, llegada a Viena. Cena y alojamiento en el hotel.

2-8-70 al 8-8-70 VIENA. Medias pensiones en el hotel.

9-8-70 VIENA. Desayuno en el hotel. Por la mañana, salida en avión de regreso a España. Con escala en Zurich, llegada por la tarde a Madrid o Barcelona.

Precio del viaje por persona en Hotel 1.ª B, habitación doble con baño:

| | |
|---|---|
| De Madrid ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 18.910 Ptas. |
| En habitación individual con baño ... ... ... ... ... ... ... | 20.976 " |
| De Barcelona, en habitación doble con baño ... ... ... | 17.741 " |
| En habitación individual con baño ... ... ... ... ... ... ... | 19.807 " |

Inscripción e informes en todas las Delegaciones de Meliá en España y en la Sección de Turismo de la Federación Española de Esperanto. Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza.

## EXCURSION TURISTICA A MIERES CON MOTIVO DEL 30 CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

16-7-70 Por la mañana, salida de Zaragoza en autopullman hacia Bilbao, visitando VITORIA, donde se almorzará. Por la tarde, llegada a BILBAO. Cena y alojamiento en el hotel.

17-7-70 BILBAO. Desayuno en el hotel. Salida hacia Santander. SANTANDER. Almuerzo, cena y alojamiento en el hotel.

18-7-70 SANTANDER. Desayuno en el hotel. Salida hacia Mieres. MIERES. Cena y alojamiento en el Hotel "Ayala".

19-7-70 al 23-7-70 MIERES. Medias pensiones en el hotel.

24-7-70 MIERES. Desayuno en el hotel. Salida hacia Burgos, visitando LEON, donde se almorzará. BURGOS. Cena y alojamiento en el hotel.

25-7-70 BURGOS. Desayuno en el hotel. Salida hacia Zaragoza, visitando SORIA, donde se almorzará. Por la noche, llegada a Zaragoza.

Los hoteles y restaurantes de camino, serán de 1.ª B, en habitaciones con baño.

| | |
|---|---|
| Precio de la excursión por persona en habitación doble ... ... ... ... ... | 3.904 Ptas. |
| Precio de la excursión por persona en habitación individual ... ... ... | 4.120 Ptas. |

Informes e inscripción, en la Sección de Turismo de la Federación Española de Esperanto. Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza.

Al igual que el viaje a Viena, esta excursión está organizada en colaboración con Viajes Meliá.

## 30ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Organizita de la Hispana Esperanto-Federacio

Okazonta en Mieres (Asturias) de la 18-a ĝis la 23-a de julio 1970.
Adreso de la Organiza Komitato: Str. General Sanjurjo, 11, Mieres.

## 2ª KOMUNA INTERNACIA KONGRESO DE KRISTANAJ KAJ KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

Okazonta en Brno —CSR— de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1970
Antaŭkongresaj tagoj (22 - 23) en Prago.
Adreso de la L.K.K.:
S-ro Aleŝ Berka, Prezidanto, Vsetin Na hrázi 1423, Ĉeĥoslovakujo.

## 55ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazonta en Vieno de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1970

Sub la Alta Protektado de
D-ro Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

## 26ª INTERNACIA KONGRESO DE T. E. J. O.

Okazonta en Gràz de la 8-a ĝis la 15-a aŭgusto 1970

Adreso de la L.K.K.:
Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz, Aŭstrujo.

## FOIRO DE MILANO

14-an ĝis la 25-an de aprilo 1970
Internacia Centro de la Interŝanĝoj.
La Foiro eldonis tre belajn afiŝojn en Esperanto.

TIP C BOLOIX - REINA FABIOLA, 7 - ZARAGOZA

D. L. Z - 375 61